

## Esperanta originala romano, laŭ Henri Vatré, 3-a parto

Claude Gacond, 70-a radioprelego, 1964.04.01 & 04

Atentu esperantistoj! Ĉi tie parolas la Svisa Kurtonda Radiostacio pri la esperanta originala romano. Vi aŭdas Claude Gacond.

Dum la du pasintaj elsendoj ni prezentis al vi tre interesan laboron de Henri Vatré pri la esperanta originala romano. Ni hodiaŭ finu la legon de tiu studo kaj konkludu.

Sinjoro Henri Vatré konstatas, «ke en nia literaturo nur poetoj de la nova esperanta generacio rivelis al ni la moralajn vundojn kaj materiajn ruinojn kaŭzitaĵojn de la terura milito, kaj inter ili precipe William Auld kaj Marjorie Boulton. Ankoraŭ neniue el niaj romanistoj rakontis iom profunde la okazaĵojn kaj fruktojn de la milito, kiel tio okazis en naciaj lingvoj.

Tamen aperis verko de la hungaro Szathmàri, kiu pentras universon obsedan kiel tiu de Hieronimo Bosch. Lia kruela *Vojaĝo al Kazohinio* estas vigla, halucina satiro laŭ la maniero de Swift. La heroo, nova Gulivero, vizitas fantaziajn landojn, kie regas la plej strangaj kutimoj kaj tabuoj – tute kiel en nia propra mondo – kiun la aŭtoro celis montri en kurba spegulo. Tie ekzemple kuŝi kun virino meze de la publiko ŝajnas tute natura ago. Sed por manĝi oni devas sin kaŝi, ĉar manĝadon ili rigardas ŝoke obscena. »

Sinjoro Henri Vatré citas ankoraŭ kelkajn verkojn, kiuj troviĝas ĉe la limo de la speco romano. En konkluda parto li parolas pri la rolo de la romano. «Se multaj legantoj postulas de la romano nuran distron, ekzistas aliaj homoj, kiuj vivas la legatan libron. Legi romanojn helpas nin mem pli bone ekkoni kaj formi juĝon pri nia persono. »

Henri Vatré diras ankoraŭ, ke «teknike, la esperanta romano posedas meriton de pedagogia valoro. Legante rakonton de bona aŭtoro ni eble senkonscie perfektigas nian lingvan konon ĝuste pro la scivolo, kiun ni sentas kreskanta de unu paĝo al la alia ĝis la fino. »

Tiu interese laboro de Henri Vatré pri la romano en nia lingvo finiĝas per bibliografia listo, kiu inkluzivas la 41 ĝis nun eldonitajn romanojn. Ni rememorigas al vi, ke Esperanto-Edukistaro de Svislando eldonos multoblige tiun unikan kontribuon pri la esperantaj romanoj, esperante tiel utili ĉefe al la grup- kaj kurs-gvidantoj, kaj al literaturemuloj.

En letero, sinjoro Henri Vatré diras pri tiu kontribuo : «Mi rigardis la temon precipe el la vidpunkto de la leganta publiko. Nun mi intencas alian, pli kompletan studon pri la rakonta originala prozo en esperanto, el la vidpunkto de la kreanta verkisto. » Kaj li ankoraŭ aldonas : «Mi bezonas legi almenaŭ dekmil paĝojn ! » Ni diras al nia samideano multe da plezuro, kaj kuraĝon, kiam la libroj estos tedaj.

Se ni dediĉis tri elsendojn al tiu temo, tio estas, ĉar ni havas la impreson, ke Henri Vatré plenumas utilegan funkcion. Sinjoro Otto Walder, la esperantista librovendisto en Svislando, kalkulis, ke 30% de la libroj, kiujn li vendas, estas romanoj. Do la esperanta publiko ŝatas tiun specon da verkoj. La granda bedaŭro estas, ke ĝis nun ekzistas, je mia kono, nenia antologio, kiu helpas tiun romaneman publikon juĝi nian prozon. Ĉar multaj romanoj de longe estas elĉerpitaj, ĉar plej ofte la grupaj kaj individuaj bibliotekoj ne posedas tiujn elĉerpitajn verkojn, estas vere ege malfacile al la studemuloj akiri valoran vidpunkton pri la artnivelo de niaj verkistoj. La rezulto estas, ke ni iom tro facile subtaksas ilian genion, komparante plej ofte ne kompareblaĵojn, aŭ limigas nian verkistaron al kelkaj nomoj.

La ekzisto de poezia antologio de post 1959 ĉesigis multajn supraĵajn dirojn rilate tiun fakon. Ni eĉ povas diri, ke ĝis 1959 la esperantistoj rajtis nekoni siajn poetojn, ke en siaj kunvenoj dum ili konstante recitis la samajn zamenhofajn poemojn, neniue kuraĝis ilin kritiki, ĉar ili estus respondintaj : indiku al ni aliajn valorajn poemojn, donu al ni juĝkriteriojn. Nun dank'al la laboro de William Auld ili konstante havas antaŭ la okuloj specimenojn de niaj plej bonaj poeziaj verkoj. Ja laŭ la personaj vidpunktoj oni estus povinta preferi de iuj poetoj

## Esperanta originala romano, laŭ Henri Vatré, 3-a parto

Claude Gacond, 70-a radioprelego, 1964.04.01 & 04

kelkajn aliajn poemojn, ol tiujn elektitajn de Auld, sed tamen ni posedas komunan kriterian fundamenton, kiu helpas nin studi nian literaturon. Kaj se oni ekzamenas la grupan vivon, oni konstatas, ke de post 1959 la esperantistaro ĉesis rigardi nur al Zamenhof kaj tuj deklamis verkojn el plej diversaj poetoj. Kaj ĉar ekzistis ebleco aprezi kelkajn el la plej belaj versoj de niaj poetoj, la poeziemuloj havis nur unu deziron, pli intimiĝi kun la poezio de siaj preferataj poetoj. Vendiĝis tiam, kaj ĉiam vendiĝas, multaj poeziaj verkoj.

La samon ni ŝatus povi fari kun la aliaj literaturaj specoj. Ni iom laciĝas ĉion mem serĉi. Ofte ni eĉ laciĝas aĉeti librojn originalajn, kiam dum deko da aĉetoj ni havis la impreson, ke ni aĉetis nur malalt-nivelajn verkojn. Rezulto : nia legemo reduktiĝas al la ŝato de kelkaj aŭtoroj. Inter ĉiuj nomoj, kiujn dank'al Henri Vatré mi povis citi al vi, kiom vi jam aŭdis ? Verŝajne ne multajn.

Ni sentas, ke nia lingvo eniras novan epokon. En multaj lernejoj oni komencas instrui nian lingvon. Aŭtomate en la gimnazioj kaj altlernejoj devos esti organizataj daŭrigaj kursoj, en kiuj oni sisteme instruos nian kulturon. Sur kiu fundamento baziĝos tiuj kursoj por juĝi niajn verkistojn ? Mi ofte faras al mi la demandon, ĉefe kiam mi devas plani instruprogramon por la daŭrigaj gimnaziaj kursoj, aŭ kiam mi provas aranĝi programon por la kultura vivo en niaj lokaj grupoj.

Ekde la festado de la zamenhofa jaro en 1959, ni povas fieri pri nia poezio. Se ni malpli recitas la poemojn de nia Majstro, tio ne signifas, ke ili senvaloriĝis, sed ke ili estas aliel ŝatataj. Oni eĉ povas diri, ke malpli recitante ilin, oni kapablos post kelkaj jaroj ilin pli bone aprezi. La samo povos okazi por kelkaj el niaj romanistoj, kiam ni posedos prozan antologion. Verkojn, kiujn post tro ofta legado ni komencas iom tro facile kritiki, ni povos fine pli alte taksu, kiam ni komprenos la rolon, kiun ili ludis en la formiĝo kaj disvastiĝo de nia literaturo.

Vi aŭdis Radio-Svislandon pri la esperanta originala romano. Claude Gacond diras al vi : Ĝis reaŭdo !

-oOo-